# LA TAŬRA VOĈO

Kongresa Kuriero de la 108a Universala Kongreso

Dimanĉon, la 30an de Julio 2023 Numero 2




La partoprenantoj en la ekskurso al Ĝenovo.

## Ekskurso kun surprizo

Oni devus pagigi al ili kroman kotizon, ĉar krom la urbon oni vizitigis al ili la italajn tunelojn en la plej akurata maniero. Fakte, pro akcidento en aŭtoŝoseo proksime de Ĝenovo, ili restis preskaŭ 2 horojn senmovaj en unu el la dekoj da tuneloj kiuj trairas Ĝenovon. Do pro tio ilia ekskurso prokrastiĝis ĝis vespero.



## Ĉiuj al la balo!

Post la tradicia bankedo, ekde la 21h00, ĉiuj gekongresanoj estas invititaj partopreni en la balo, kiu okazos en la Reĝaj Ĝardenoj de la urbo, ĉe la Reĝa Palaco, sub la eksterordinara direktado de Kimo kaj Jomo.

Nepre ne maltrafu tiun eksterordinaran okazon ĝui Esperantan etoson en la belegaj reĝaj ĝardenoj. Dum la vespero eblos viziti la romian teatron kaj plurajn aliajn branĉojn de la reĝaj muzeoj.

Por scii pli pri la ĝardenoj kaj la romia teatro legu en la gvidlibro "*Musei Reali* - Enkonduko alla vizito" (inter la donitaĵoj de la sako) kaj tiel vi ankaŭ donos sencon al la laboro de la redaktintoj.

## Enmigrado kunfluo de homaj valoroj

Enkonduka prelego en itala lingvo kun traduko al Esp-o Gianfranco Cattai el Torino prezentos al ni la enkondukan prelegon pri la kongresa temo, hodiaŭ je la 14a horo en salono Clerici. S-ro Cattai estas aparte kompetenta kaj sperta pri la kongresa temo el la vidpunkto de la civila socio de la urbo Torino. S-ro Cattai estas reprezentanto de la neregistaraj organizoj "Cicsene" kaj "Retinopera" kiuj celas socian justecon tutmonde kaj kiuj subtenas migrantojn kiuj vivas en Torino.

S-ro Cattai prelegos en itala lingvo – traduko de la prelego al Esperanto estos projekciita sur ekrano, tiel ke ni povos bone sekvi la prelegon. Post la prelego vi povos starigi demandojn: demandoj kaj respondoj estos tradukitaj.

Jen konciza priskribo pri la prelego de G. Cattai:

*"La urbo Torino kaj la civila socio de Torino en la 90aj jaroj forte renovigis kaj la akcepton de enmigrantoj kaj la interkulturan dialogon. Per profunda analizo de diversaj iniciatoj ni komprenos kiel Torino anticipis la unuan italan leĝon kiu reguligis enmigradon en Italio. Nuntempe Torino ne povas eskapi la malfacilaĵojn kiujn kaŭzas enmigrado je nacia kaj je eŭropa niveloj, sed Torino manifestas homajn valorojn kaj konkretigas spertojn de akcepto kaj solidareco."*

## KOMUNIKOJ

### Ĉukpilka leciono

La 3an de aŭgusto, ĵaudon, ĉe la kongresa sportejo en Corso Ferrucci 63, de la horo 17a okazos la programero: "Lernu ludi ĉukpilkon en 1 horo!"

### Manĝoj

Eblas manĝi ĉe la universitata manĝejo. La elekto de manĝoj taŭgas por ĉiomanĝantoj, vegetaranoj, veganoj kaj personoj kun netoleremo al gluteno. La tagmanĝoj estas servataj de la 12h00 ĝis 14h30 kaj vespermanĝoj de la 19h00 ĝis la 20h00. La manĝejo troviĝas tuj apud la Kongresejo kaj Salono Zamenhof.
La manĝkuponojn eblos aĉeti en la Informejo de la Kongreso ĉiutage de la 9h00 ĝis la 11h00. Eblas mendi manĝojn jam ekde la unua sabato.
Por ricevi senglutenajn manĝojn bonvolu tion anonci kiam vi aĉetas la kuponojn.
**N.B. La horaro por la tagmanĝo estas de la 12h00 kaj ne, kiel erare skribite, de la 11h30**.

### Prezoj

9 € (kompleta menuo)
Pastaĵo (supo aŭ rizo) kaj ĉefplado kun legomoj, frukto aŭ deserto, panoj kaj trinkaĵoj.
Griza kupono
7 € (Menuo A)
Pastaĵo (supo aŭ rizo), legomoj, frukto aŭ deserto, pano kaj trinkaĵoj
Helblua kupono
8 € (Menuo B)
Ĉefplado kun legomoj, frukto aŭ deserto, pano kaj trinkaĵoj
Flava kupono
Eblas vidi la menuon de la tuta semajno apud la afiŝo ĉe la anonctabulo.

### Alternativaj manĝoj

Se oni emas manĝi ion pli rapidan, kiel picon aŭ tradician kukon farĉitan, oni povas sin turni ĉe la trirada motorciklo ekster la enirejo de Corso Castelfidardo (survoje al la manĝejo). Li vendas ankaŭ glaciaĵojn.

### Trinkebla akvo je dispono

Se oni volas plenigi siajn botelojn, en la konstruaĵo estas du punktoj kie estas aŭtomataj fontoj de akvo (malvarma kaj meditemperatura), senpagaj. Apud ili estas ankaŭ aŭtomataj distribuiloj de aliaj tipoj de trinkaĵoj, kafo kaj dolĉaĵoj (kontraŭ pago).
Unu estas ĉe la fino de la sama koridoro, kie situas necesejoj (maldekstre de la akceptejo). La alia estas ĉe la enira koridoro de Corso Castelfidardo (tuj post la pordo interna, maldekstren).
Se vi ne sukcesas trovi, demandu la volontulojn aŭ organizantojn.

## PROGRAMO

### Ekumena Diservo kaj Katolika Meso

Kiel anoncite, la Ekumena Diservo okazos je la 16.00h, kaj tuj post ĝi de la 16.45h ekas la Meso.
La preĝejo troviĝas en la eduka komplekso de la salezianoj kaj la eniro en la preĝejo troviĝas en la strato Via Giuseppe Piazzi 21/23.
De la Kongresejo la preĝejo estas je pieddistanco de 13 minutoj.
Post la tram/bushaltejo Vespucci eniru maldekstre straton Via Amerigo Vespucci.
Dua strato dekstre estas strato: Via Giuseppe Piazzi.
Tuj post la angulo de Via Sebastiano Caboto kaj Via Giuseppe Piazzi 21/23 ĉe la maldekstra flanko vi ekvidos la enirejon de la preĝejo.

*Marija Belošević, KN117*

### La Kuriero de la Kongreso

La Kuriero de la Kongreso ĉi-jare estos la Taŭra Voĉo kaj ĝia redaktoro Pier Luigi Cinquantini KN255. La redakcio kolektas viajn kontribuojn ĉe la retadreso: **kuriero@esperanto.it**
aŭ pere de organizantoj ĉe la informejo aŭ persone. La redakciejo estas ĉe la Oficejo de LKK.
Viaj raportoj, anoncoj, fotoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj/senditaj al la redakcio plej malfrue je la 18a horo de la kuranta tago kaj kun ili estu ankaŭ indikita la Kongresa Numero kaj la nomo de la aŭtoro. Anticipan dankon por via kunlaboro.

### Promenadoj tra la urbo

Se vi emas promeni tra la urbo memstare, skanante ĉi tiun QR-kodon, vi povas elŝuti sondosieron entenantan gvidilon kaj relativan mapon, per kiuj vi povos libere viziti la urbon. Vi povas elekti inter 6 itinerojn.
Instrukcioj: Skanu la QR-kodon kaj kiam vi atingos **Bitoteko.it**, elektu unu el la itinerojn kaj alklaku ĝin: tie estos du dosieroj, unu aŭda kaj unu pdf'a elŝutu al via poŝtelefono kaj malfermu per via apo por aŭskulti sondosierojn kaj sekvu la itineron signita en la pdf-dosiero.
Kaze de malfacilaĵoj, petu helpon de volontuloj.